

pri la praktikaj ebloj kiuj kuŝas por ili en la sistema uzado de neŭtrala, de ĉiu perfekte regebla, lingvo en iliaj internaciaj rilatoj. Oni decidis emfaze, unuflanke instigi la studentojn de tiuj Universitatoj kie Esperanto jam estas instruata dediĉi la necesan atenton al ĉi tiu studfako, kaj aliflanke agadi ĉe la aliaj Universitatoj por atingi ke oni sekvu la ekzemplon de la unuaj kaj donu al la sola efektive uzata artlingvo la atenton kiun ĝi meritas.

D. Internacia Federacio de Esperantistaj Studentoj kaj Altlernejoj. (IF ESA) estis fondata. Ĝi celas akceli internacian kunlaboron de studentoj kaj altlernejoj per Esperanto, kaj tiucele intencas i.a. eldoni revuon (daŭrigon de nuna „La Studento”), aranĝi internaciajn renkontojn, starigi fakan informservon, kunlabori kun aliaj internaciaj studentaj kaj kulturaj organizaĵoj.

Membro povas fariĝi ĉiu kiu studas aŭ studis en universitato aŭ samranga altlernejo. Organizaĵoj povas aliĝi kolektive. La kotizo estis fiksata je 1.50 us. dol.; la prezidanto estas s-ro Joh. Vesterland-Andersen, la adreso la supre menciita.

Mi ne povas ne laŭdi la preparan komitaton (s-rojn Joh. Vesterland-Andersen, Kopenhago; M. Schmidt, Freiburg (Germanujo) kaj D. Kralj, Ljubljana) pro la bonega organizado. Volonte mi atentigas la esperantistaron pri ilia energia, celkonscia laboro, kaj petas la samideanojn subteni ĝin ĉiam kiam eble, ĉiel.

C. A. ten Seldam.

Sekretario de „Universitata Esperantista Rondo Amsterdama”.

327.2 : 409.35 : 56/59

LINGVA IMPERIISMO?

Jam antaŭ longa tempo Prof-o d-ro I o C h o u, ĉina entomologo en Ĉang-Cia-Kang, Ŝensi, Ĉinujo, plendis en letero al via redaktoro pri lingva imperiismo en la scienco:

„La sciencaj studoj estas ignorataj se ili ne estas skribitaj en angla, franca, germana, itala aŭ latina lingvo. Tio estas fakto decidita en skribitaj aŭ kutimaj reguloj. Tiaj skribitaj reguloj estas, ekzemple:

1. *The International Rules of Botanic Nomenclature*, Art. 37, Art. 45 (agnosko nur de la latina).

2. *The International Rules of Zoological Nomenclature*, Art. 36 A, B (nur kvin lingvoj).

3. *The Entomological Code*, Art. 119”.

Mi sukcesis trovi kaj kontroli la unuajn du verkojn, sed bedaŭrinde ne la trian.

Montriĝis ke la aserto de Prof-o Chou ne estas tute ĝusta.

1. Art. 38. „Ek de 1-I-1935 nomoj de novaj grupoj de hodiaŭaj plantoj — malkrom bakterioj — estas rigardataj valide publikigitaj nur se ilin akompanas latinlingva diagnozo. — **Nota:** Ĉi tiu artikolo validigas nomojn de novaj grupoj efike publikigitaj inter 1908 kaj 1935 kun diagnozo en *moderna* (laŭ la angla kaj franca tekstoj) (resp.) *vivanta* (laŭ la germana teksto) lingvo”.

En la 2a eldono (de 1911), kaj eĉ jam en la 1a eldono (1905) troviĝis simila preskribo ke la diagnozo estu en lingvo latina (artikoloj 36 (1a eldono), 36, 36bis, 39 (2a eldono)).

Tamen, evidente kĉ post la unua limdato (1-I-1908), kĉ post la dua (1-I-1912) oni daŭrigis publikigadon de diagnozoj botanikaj en hodiaŭaj naciaj lingvoj, kaj ĉiufoje, malgraŭ la minaco ke oni ne rekonos tiajn kaj ke la nomoj ne akompanataj de latinlingva diagnozo estos ne validaj, oni poste cedis antaŭ la faktoj, denove decidis samsence kaj starigis novan limdaton!

Konsiderinda estas ankoraŭ la jeno: (2a eldono) „*Rekomendoj*. XX. Kiam oni publikigas nomojn de novaj grupoj en verkoj modernlingvaj (flaŭroj, katalogoj, ktp.) oni samtempe publikigu latinlingvan diagnozon kaj en la paleobotaniko ankaŭ la figurojn kiuj igas ĉi tiujn nomojn validaj el la vidpunkto de scienca nomenklatur.

XXbis. Pro la specialaj malfacilaĵoj kiuj akompanas la identigon de plantoj fosiliaj, oni donu, krom la latinlingvan diagnozon, detalan priskribon en franca, angla, germana aŭ itala lingvo”

2. Deko Kongreso Internacia de Zoologio, Budapeŝto, 4-10-IX-1927.

„*International Rules of Zoological Nomenclature*” (p. 1583 ...) paĝoj 1595-6: *Aldonaĵo*. „Estas tre dezirinde ke la propono de ĉiu nova sistema grupo estu akompanata de diagnozo, kĉ individua, kĉ diferenciga, de la koncerna grupo en la angla, franca, germana, itala aŭ latina lingvo”.

„B. — En publikigaĵoj en lingvo alia ol la angla, franca, germana, itala, aŭ latina, estas tre dezirinde ke la klarigo de figuroj estu tradukita en unu el ĉi tiuj lingvoj.”

Ĉi tiuj citaĵoj montras — kion ni ja tre bone scias — ke oni baraktas en lingva marĉo! Oni *deziresprimas* ke oni uzu — almenaŭ por plej gravaj aferoj — unu el la lingvoj angla, franca, germana, itala aŭ latina, sed oni *ne devigas* al tio.

Laŭ la menciitaj reguloj, nur en la botaniko oni postulas ke, por ke nova nomo estu valida, ĝin akompanu latinlingva diagnozo. Sendube la latina lingvo estas malfacila; sendube, ankaŭ, por azianoj multe pli malfacila ol por italoj. Tamen ĝi ne apartenas al iu nun vivanta nacio, kaj do tiurilate estas neŭtrala. La plendo de Prof-o C h o u do ne estas tute ĝusta: nur por diagnozoj en la botaniko la latina lingvo estas preskribita.

Ratas vere, kompreneble, ke la individuaj sciencistoj formetas — se iel eble — publikigaĵojn en lingvoj kiujn legi ili ne aŭ nur tre malfacile povas. Jen

sekvo nur de la homa inerteo. La okcidentaj sciencistoj kun ege maloftaj esceptoj, ne povas legi la lingvojn ĉinan kaj japanan, ekzemple. Sed eĉ tiuj kiuj scipovas legi ĉiujn kvin lingvojn supre menciitajn estas malmultnombraj. La devigita studo de pluraj fremdaj lingvoj estas peza ŝarĝo por okcidentanoj; por orientanoj ĝi estas ŝarĝo eĉ multe pli peza, ŝarĝo de kiu ni kiel eble plej baldaŭ liberigu nin. En tiu liberigo forte helpu la azianoj kiuj ja pleje spertas la mizeron nunan.

Se vi, azianoj, volas, vi povos forigi ĉi tiun lingvan mizeron en ne tro longa tempo. Sufiĉas por tio: ne plu uzi la naciajn lingvojn eŭropajn, sed nur la lingvon internacian. Tio levus ĉi tiun lingvon al la nivelo de la gravaj lingvoj naciaj, forigus la barojn kiuj ĝis nun malhelpas al publikigo en la internacia lingvo, kaj en relative mallonga tempo kondukus al ĝia preskaŭ ĝenerala uzo.

La levilo troviĝas en viaj manoj. Do uzu ĝin. — *La Redaktoro.*

408.92.004.14 : 331

DU STARPUNKTOJ KAJ ILIAJ KONSEKVENCOJ.

La homojn kun kiaj ajn rektaj internaciaj rilatoj — inter aliaj do la scienculoj — oni povas grupigi en du kategoriojn, laŭ la starpunkto kiun ili tenas koncerne la lingvan demandon.

La anoj de la unua grupo opinias ke naciaj lingvoj estas adekvataj iloj por internacia interkomunikiĝo, ke neŭtralan internacian lingvon oni por tio ne bezonas. La alia grupo, kontraŭe, tenas la malan starpunkton: ĝiaj anoj opinias ke la haoson de la multlingveco en la internacia trafiko povos forigi nur la ĝenerala akcepto de unu neŭtrala internacia lingvo.

Ambaŭ starpunktoj havas konsekvencojn, kiujn ni nun iom konsideru.

Ĉar la praktiko ĉiutage denove montras — (oni rigardu, ekzemple, la kunvenojn de UIN kaj de ties sub-organizaĵoj; oni rimarku ke la multlingveco ĉe la internacia poŝta unio — malgraŭ ties ununura „oficiala” lingvo, la franca — kreskas, kiel atestas la internaciaj poŝtaj respondkuponoj) — ke unulingveco ne estas atingebla en la internacia vivo surbaze de nacia lingvo — (por tio necesus perforta trudo de tia lingvo flanke de nacio aŭ grupo de samlingvaj nacioj subiginta al si la tutan mondon) — kaj ke eĉ limigo de la nombro de la lingvoj internacie uzataj — ekzemple por sciencaj publikigaĵoj — al du aŭ tri estas nur iluzio, do la *nepra konsekvenco* de la unua starpunkto estas la *akcepto de la multlingveco* kiel neeviteblaĵo, kaj oni do rajtas atendi de la anoj de la unua grupo ke por ili neniu nacia lingvo prezentas malfacilaĵojn, ke tradukojn ili ne bezonas, aŭ, se ili tamen bezonas, ke ili mem havigos tiajn al si.

La anoj de la alia grupo, kontraŭe, honeste deklaras ke tiajn kapablojn, povojn kaj eblojn ili ne havas, ke la posedo de unu facila internacia lingvo krom la propra nacia estas ankoraŭ laŭ iliaj kapabloj, ke, tamen, la posedo de ĉiuj, aŭ eĉ de kvin aŭ dek, malfacilaj naciaj lingvoj multege superas iliajn eblojn.

Tial la aldono de resumo en la internacia lingvo al verkoj nacilingve publikigataj, estas logika ago. Tiaj resumoj ja servas al la anoj de nia dua grupo, kiuj — laŭ propra konfeso — ne posedas kaj ne kapablas posedi la naciajn lingvojn. Speciale salutinda estas la aldono de tiaj internacilingvaj resumoj — fare de la redakcio — al ĉiuj nacilingvaj artikoloj publikigataj en scienca gazeto, kiel tion faras, ekzemple, la „*Journal de Médecine de Lyon*”.¹⁾

La ankoraŭ de kelkaj sciencaj gazetoj praktikata aldono de alinacilingvaj resumoj al nacilingvaj artikoloj, tamen, estas superfluaĵo: por la membroj de la dua grupo tio ne prezentas solvon, kaj pri la membroj de la unua grupo oni plene rajtas supozi ke ili ne bezonas ĝin.

Ankaŭ la dua starpunkto havas siajn konsekvencojn. La ĉefa estas ke oni mem uzu la internacian lingvon (kiel eble plej) konsekvence en interkomunikiĝo kun alinacianoj kaj kiam oni publikigas por multnacia publiko. Ni ĝoju, ke pli kaj pli da sciencistoj publikigas en Esperanto; ni salutu — kaj aĉetu kaj legu! — verkojn tiajn kia tiu de prof-o Lapenna kiun ni recenzis en la pasinta numero kiun tre favore recenzis jam ankaŭ kelkaj nacilingvaj jurfakaj gazetoj²⁾. Ni konsciu ke jam sufiĉe da fakaj gazetoj pretas akcepti internacilingvajn artikolojn por ebligi al ĉiuj sciencistoj tenantaj la duan starpunkton, plene akcepti la konsekvencon de tiu starpunkto kaj publikigi la rezultojn de sia scienca laboro en la lingvo internacia. Cetere, ni ne hezitu sendi sciencajn artikolojn verkitajn en la internacia lingvo al la redakcioj de fakaj revuoj en kiuj ĝis nun internacilingvaj artikoloj ne aperis. Ja la ŝanco ke oni akceptos tian artikolon, ekzistas. Kaj se oni rifuzos, almenaŭ oni konstatu ke ekzistas aŭtoroj kiuj sendas tiajn artikolojn, kaj la redakcioj al kutimiĝu ricevi ilin.

Ankaŭ en sia korespondado oni uzu la internacian lingvon. En mia profesia laboro mi faras tion kiom eble plej. Ja se anglo, usonano, hispano, franco, germano, italo aŭ ruso skribas leteron al eksterlando, li — ĝenerale — uzas sian propran nacian lingvon kaj eĉ ne konscias ke almenaŭ li ekskuzu sin pro tio. Ni, internacilingvanoj, nature uzu en tiaj kazoj la internacian lingvon, sen ekskuzo, sed eventuale kun klarigo ke la uzo de tiu lingvo estas ago de internacia ĝentileco, kaj en okazo de bezono eĉ kun aldono de traduko en ia nacia lingvo. Nur tiel ni povas konvinki la homojn ke internacia lingvo ekzistas kaj estas uzata, kaj ke valoras la penon lerni ĝin.

Ni nur ne timu la konsekvencojn de nia ja ĝusta starpunkto!

La Redaktoro.

¹⁾ Oni gratulu kaj danku al ĉi tiu gazeto pro ĉi tiu grava servo al tiuj kiuj scias sin ne kapablaj posedi ĉiujn lingvojn. La adreso estas: *Journal de Médecine de Lyon*, 52, rue Victor Hugo, LYON, Francujo. Esperantaj kuracistoj kiuj interesiĝas pri iu artikolo aperinta en ĉi tiu gazeto, skribu — kompreneble en Esperanto — al la aŭtoro, pere de la *Journal de Médecine de Lyon*.

²⁾ Vidu paĝon 116 de ĉi tiu numero.